

& Enuo laborista:

< Rekante 24 el 55 batoj por strofo, entute 385 paŝoj dum 5 minutoj. Poemon verkis G. Lagrange (nica literatura revuo 7/5 (n-ro 41) p. 165). Baladigis kaj komponis Martin Strid.>

(#Melodio:

<:55> (

a;mi /mimi remi fa sofa mi reedore miido;do mimi rere mi fami rere dore mimi;
miimimi remi fa sofa mire dore miido;do mimi remi fa solfa miimire doTi LaLa;

(#Rekantaĵe: So SoSo dore mifa mire mido reLa; So LaTi doTi LaFa SoSo Ti i; dodo
miirere do Tido La; So SoSo dore mifa mire mido reLa)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Ma/tene ci gluiĝas al mi, kiel la
ŝlimo, ; enuo, vivomastro kaj reĝo
ĉiopova, ; kiun kapablas venki neniam
io nova; kaj sentas mi tuttago2n guston
de cia ŝimo.

(×: **Ĉendanco estas lumo en ekzisto
nia ; Dancu ekstazon en komuna tret'
; Kantu gaje kun tondra impet' ;
Ĉendanco estas lumo en ekzisto nia.**)

'2 Enuo senkuraca de l' grizo ĉiuhora, ;
ne tiu multekosta de vivo tro malplena,
; nek tiu romantika de menso riĉe
splena: ; sed tiu de l' realo, eterne
lacodora.

'3 Kiel azen' karoton sekvas kaj ĉaron
trenas, ; en postkurad' absurda al
estonteco hela, ; kaj daŭre baraktante
en la mucido kela, ; mi tiel stultan
vivon plu tiras kaj eltenas.

'4 Perdiĝas viglaj jaroj en taskoj de
abelo, ; en vanaj necesajoj, kiuj
nomiĝas devoj, ; dum fuĝas vera vivo,
forflugas altaj revoj ; kaj ĉio interesa,
ĉiam por tuja celo.

'5 Ripozaj horoj, paŭzoj kaj tempoj
sunferiaj ; pasas vaporaj kiel
matennebul' surlaga, ; sed ne plu
forgesiĝas la kruda ĉiutaga ; kaj peza
jungiteco ĉe l' zorgoj materiaj.

'6 Enuo pro l' kunhomoj kun etanima
klaĉo, ; enuo pro l' fremdeco al mondo
tro maljusta, ; enuo pro okupo banala
kaj sengusta, ; enuo pro l' vulgare de l'
vanta babilaĉo.

'7 Senlima, monotona, enuo mare
vasta, ; enuo, kiun amo momenton nur
forŝminkas, ; indiferent', en kiun ĉia
vivemo sinkas, ; kaj kiu finsopiras al
nenieco lasta...)